

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

№ 3

Marto, 2017

Karaj niaj Legantoj, jen estas dua ĉi jara numero de la oficiala organo de la ESdŜ, kiu krom interesaj informajn artikolojn enhavas ankaŭ ne tre agrablan informon: ni plu ne kunsidos en la konstruaĵo de la Ŝuista Placo. Kiel skribis s-no Hanso, ĉio bona devas iam finiĝi. Do, tio okazis.

Pri ĉio alia vi mem povas legi.

–La Redaktoro

Vojaĝantoj: Ekkonu Esperantistojn! –de Hanso Becklin

En Januaro, dum la intersemestra paŭzo ĉe nia universitato, mi kaj mia edzino vojaĝis al Londono kaj Rejkaviko. Kiel kutime, ni elektis tiujn lokojn ĉar malmultekostaj flugbiletoj kondukis nin tien el Ŝikago. Se vi ĉeestis la februaran kunvenon de nia societo, vi jam scias multe pri la muzeoj, preĝejoj, parkoj kaj ceteraj vidindaĵoj de tiuj du surinsulaj ĉefurboj. Efektive, nia vojaĝo estis bonega kaj rekomendinda, precipe dum Januaro kaj Februaro, kiam ambaŭ urboj estas malpli plenŝtopitaj de turistoj, sed same vidindaj. Tamen, en la prelego mi ne multe priskribis mian viziton al la Esperanto Klubo de Londono, ĉar tiu primovada temo ne estis konvena.

Planante la vojaĝon al Londono kaj Rejkaviko, mi surstrekis vice la plej gravajn farenaĵojn: aĉetu flugbiletojn, luu malmultekostajn ĉambrojn en ambaŭ urboj, esploru pri senkostaj muzeoj kaj preĝejoj, kontaktu Esperantistojn...

Pri tiu laste menciita farenaĵo, mi rekomendas al la mondvojaĝanto, kiu parolas Esperanton, tion: kontaktu samideanojn en la vizitotaj urboj kiel eble plej frue. Se grupo kunvenos iam dum via vizito, tiuj homoj scios pri ĝi multe pli bone kaj frue ol ajna retejo. Kvankam la plejmulto de la Esperanto-grupoj en la mondo kunvenas monate (aŭ malpli ofte), mi neniam kontaktis grupestron aŭ aktivulon, kiu ne ofertis liberajn horojn por manĝo aŭ kafumado, sin kiel ĉiĉeronon, aŭ eĉ specialan kunvenon de la loka grupo pro via ĉeesto en la urbo! Se vi vizitas lokon, kie ne estas Esperanto-societo, oni povas kontakti iun, kiu listiĝas en la Jarlibro de UEA aŭ en la Pasporta Servo de TEJO.

Feliĉe, la prezidanto de la londona klubo rapide respondis al mi, skribante ke ili ja kunvenos dum mia vizito. Fakte, la klubo en Londono estas sufiĉe aktiva: ili renkontiĝas ĉiun vendredon, kun malsimilaj programoj. Kelkfoje ili kune diskutas aktualan temon; kelkfoje ili havas prelegon (ofte fare de unu el la pluraj akademianoj, kiuj membriĝas en la klubo); kelkfoje ili priparolas la



Esperantan literaturon.


Komunikante kun la prezidanto kaj kelkaj aliaj homoj en la klubo, mi konstatis, kiam kaj kie ili kunvenas kaj kiel atingi ĝin pli facile per metroo. Malsame kiel Ŝikago, kie oni povas facile orientiĝi pro la stratkrado kaj la grandega lago, al Londono mankas kaj granda nombro da nubskrapuloj urbocentre kaj senchava urba planado. (Bonaj rektiloj, mi supozas, inventiĝis post la fondiĝo de Londono en 43 p.K.) Tial mi alvenis iomete malfrue; jam komencis John WELLS sian prelegon pri “Anglaj idiotismoj”. Bonŝance, mia nur maltrafis lian difinon de “idiotismo”, vorto, kiun mi konis.

Li provizis nin per listo da anglaj idiotismoj, kaj li instigis ĉiun ĉeestanton trovi iun, kiu ne havas la saman denaskan lingvon, por ke la paro traduku la idiotismojn en Esperanton. Same kiel ĉe ni en Ŝikago, tiu problemo ne estis defio inter la 15 ĉeestantoj, kiuj devenis de pli ol 8 landoj. Sed la idiotismoj, kiujn ni tradukis, estis sufiĉe anglaj; mi sentis min kiel fremdulo! Post niaj klopodoj, prof. Wells gvidis diskuton pri la diversaj manieroj traduki la frazojn. Kelkaj estis vere tiklaj, ĉar ili estas nur konversacia spico. Flua parolanto scias kiam oni uzu ilin, sed ne vere komprenas la signifon!

La bonega “lingva seminario” daŭris unu horon, kaj fine de la prelego la prezidanto bonvenigis min nome de la londona klubo, kaj donis al mi tempon por saluti la klubon nome de nia societo. Pluraj homoj demandis min pri nia redaktoro Viktoro, kiu estis membro tie antaŭ jaroj. Post la prelego, triono de la homoj eliris por trafi la ĝustan trajnon hejmen. Sed la plimulto restis por konversacii neformale.

Ni sidis ĉirkaŭ tabloj, ronĝante keksojn kaj trinkante teon. Interesis min, ke same kiel ĉe mi en Ĉikago, la britoj ŝatas trinki dum vespero ian kvazaŭteon (pli precize, tizanon) kiu venas el Sud-Afriko kaj nomiĝas “ruĝarbusta teo.” Kvankam mi multe stimuliĝis, mi certas, ke tiu stimulado venis de la bonega, ridetiga interparolado kaj ne de la senkafeina tizano. (daŭrigota...)

Renaskiĝo de Ukrainio – de Araneo



La 22-an de Marto 1959 naskiĝis ege fama bardo de Ukrainio Andreo Panĉiŝin. Kvankam laŭ profesio li estis ekonomisto, sed la tutan sian vivon (mortis la 11an de Oktobro 2015) li pasigis kiel kantisto, verkisto, ĵurnalisto. Meze de 90-aj jaroj de la pasinta XX j.c. li ekverkis plotokajn satirajn kantojn (vd E-tradukon de unu el ili en la majstra traduko de Denteto – renoma ukraina-E-a tradukisto). S-rom Andreo (Andrij – *Ukraine*) estis konata ankaŭ kiel la Lasta Batjaro – homoj, kiuj parolis specofan Ivivan dialekton “gvara” – mikso de la pola, ukraina, jida lingvoj. Li estis unu el renaskintoj de tiu

Iviva sub-kulturo meze de la 1990-aj jaroj (kune kun V. Morozov, J. Vinniĉuk k.a.). Dum la lasta revolucio sur la Majdano (Kijivo, Ukrainio, 11.2013 – 02.2014) li verkis multajn majdanajn kantojn (vd Belatra Almanako, Feb., 2014). La proponata traduko aperas en nia bulteno la unua-foje.

* **Kanto pri Socie Utila Dormado** *

de Andrij Panĉiŝin

Se dormas la infano – estas bono,
Ĉar dum dormad’ neniam ploras ĝi.
Ne veku la infanon sen bezono,
Se paradizon hejme volas vi.

Kaj scias bone reĝoj, prezidentoj,
Saĝecon tiun scias el lulil’:
Se dormas homoj dolĉe kaj silente,
En landon venas bono kaj trankvil’.

Ne verŝas sangon la rabist’ dormante,
Okazas dum dormad’ neniu ŝtel’,
Ke ĉiuj dormu, sonas la lulkantoj
Dum noktobskuro kaj dum taga hel’.

Kaj dormas pace ŝtatanar’ senbota,
Vekante sin pigreme foje nur
Al la preĝej’, banej’ kaj al baloto
Kaj ankaŭ por neceso de l’ natur’.

Naskiĝis foje dum dormado buboj,
Se en ĉemiz’ – do nur en dormĉemiz’.
Se iu ĉesas ronki – do, sen dubo,
Anim’ forflugis jam al paradiz’.

Al ŝtato ne minacas la renversoj,
Des pli revolucia ajna ŝtorm’.
Dormantoj ja ne povas kontraŭ esti,
Nur “por” votadas ĉiuj per la dorm’.

En paradizon lando sin transformas,
Feliĉa kara lando Dormantuj’.
Hej! Kiu tie vagas kaj ne dormas?
Se estas patriot’ – ekdormu tuj!

–*Elukrainigis Denteto,*
Oktobro 1988

De la E-mondo: – Informis Libera Folio

Forpasis la fondinto de Esperanta respubliko, Bolonja inĝeniero Giorgio Rosa (1925-2017), la kreinto de la “Insulo de la Rozoj”, artefarita platformo starigita en la Adriatika maro, fronte al Rimini, 400 metrojn ekster la italaj teritoriaj akvoj, kiu la unuan de majo 1968 estis memproklamita sendependa ŝtato kun nomo en Esperanto. La “respubliko” elektis kiel sian oficialan lingvon Esperanton, havis registaron, monunuon kaj eldonis poŝtmarkojn. Ĝi tamen neniam estis rekonita de iu ajn lando de la mondo kiel sendependa ŝtato.

Aperis la unua numero de la revuo Esperanto sub la respondeco de la nova redaktora duopo. Paweł Fischer-Kotowski konstatas, ke la nova numero ne draste diferencas de aliaj aperintaj dum la lastaj jaroj – ĝi estas nek katastrofa nek brila.

“Ne estas Heroldo de Esperanto”, tekstas la titolo de la plej nova eldonaĵo de Kultura Centro Esperantista. La Civito pasintjare vendis Heroldon al Fabrício Valle, sed nun neatendite aperigis propran informfolion kun la sama aspekto kaj paĝokapo.

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn
Membro – Hans Becklin

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website. Gifts are welcome also.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn 828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

NOVA LOKO

Venonta kunsido okazos 7:00-9:00pt laŭ en la Centra Biblioteko laŭ en la adreso: 400 S. State St., Ŝikago, IL ~ **Bonvenon!**

28an de Marto – Kaliforniaj Vitejoj

25an de Aprilo – Zamenhofa Jaro, Prelegas Prez. D-ro Kordylewski

23an de Majo – 500-Jariĝo de Reformacio, Gvidas Hanso

(18an) 25an de Junio – Tradicia Somera Pikniko

25-an de Julio – pri Kaliforniaj Vitejoj Rakontas Araneo

22-an de Aŭgusto – UK en Seulo per Okuloj de S-no Leszek